



BOLETIN

A B R I L

1 9 5 0

Ruzafa, 7

VALENCIA

(ESPAÑA)

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

CUESTION DE SERIEDAD

Como en todos los caminos, en el de la propaganda por un ideal se encuentran piedras que dificultan la marcha, y, por contrapartida, alguna que otra flor en las orillas, que aroman y embellecen la penosa tarea, dando alegría y vigor al viandante.

Piedras, y no pequeñas, son para nosotros, no las dificultades de nuestra misión, pues tarde o temprano han de ser arrolladas por nuestro empuje, sino la indiferencia y la ironía de simples y despistados, que, faltos de razones contra nuestra campaña, encuentran más cómoda y regocijante la burla infundada y estulta.

Las críticas más o menos razonadas no nos molestan, puesto que, al fin y al cabo, todo razonamiento bien planteado ha de conducir inexorablemente, a la justificación de nuestra lucha por el Esperanto.

La alegación más corrientemente utilizada es: «El Esperanto es una utopía; ninguna persona seria puede molestarse en estudiarlo. No hay ni remota probabilidad de su aceptación. Y, en todo caso, después de aprenderlo ¿Para qué sirve?»

Esto es lo que todo esperantista se habrá oído cientos de veces, junto a una mirada irónicamente conmisericordiosa...

Pues bien; a los que tal cosa alegan, pensando tan solo en su insulismo mental, les contestaremos con dos hechos concretos, de última hora, que les demostrarán que muchas personas serias, de lo más serio que puede existir en el mundo, opinan muy favorablemente sobre el Esperanto.

«The Foreign Office Language Society», esto es, el «Departamento Lingüístico del Ministerio Británico de Negocios Extranjeros», entre otros idiomas, enseña el Esperanto a diplomáticos, funcionarios civiles y oficiales del Ejército y Policía. Lo cual, lisa y llanamente quiere decir que, a pesar de que se ha pretendido convertir el idioma inglés en idioma universal, sus propios padrinos deben reconocer las grandes probabilidades de éxito del idioma de Zamenhof para tal destino.

Y no podemos dudar de que son gentes serias....

Por otra parte, no es cosa nueva que unos cuantos Obispos de la Iglesia Católica preconizaron recientemente en Austria y Alemania, la enseñanza del Esperanto en las escuelas y universidades, para dar a la juventud un instrumento de intercomprensión.

Con ello siguieron la pauta trazada hace unas décadas por S. S. Pío X^o, repetidamente confirmada por S. S. Pío XII^o, quien, durante el actual año Santo, recibirá en Roma el homenaje de los católicos esperantistas del mundo entero.

Es este un testimonio de una «seriedad» irrefutable, por no decir insuperable.

Así pues, si el Esperanto es tomado en serio por la Iglesia Católica y por el «Foreign Office», los que dudan de la «seriedad» de nuestro idioma están en peligroso trance de hacer «seriamente» el ridículo.



La vorto Esperanto estas, per si mem, ne nur konata nomo de la lingvo internacia, sed populara kvalifiko de universaleco en kiu ajn afero facile komprenebla de plej diversa publiko. Jen do speciala kvalito de nia lingvo, pri kiu ne multe oni rimarkas!

PRAKTIKA VIRO

Hispana familio estis devigata veturi eksterlandan. La gepatroj tute ne konis fremdajn lingvojn. El la du filoj, la plej aĝa, «praktika» viro, lernis la anglan lingvon, ĉar parolata ĝi estis en la lando, kien ili iris. La plej juna filo, idealista viro, lernis Esperanton spite al la moko kaj rikanoj de sia frato. Alveninte en la havenon de la koncerna urbo tuj ekmontriĝis la metaŝgeco de la klopodoj de la plej aĝa frato por ia interkompreniĝo kun la enlandanoj. Plenaj de amara sento, kaj kvazaŭ surdmutuloj, ili finis tiun maŝgojan tagon en gastejo, sen amikoj, sen helpe kaj sen akompano.

La sekvantan tagon, la plej juna filo foriris de la gastejo kun sia patro; li montris ian adreson al preterpasanto, kiu per gestoj indikis al li direkton; fine ili haltis antaŭ pordo. Nia hispana amiko frapis timeme ĉe tiu pordo, kaj mezaĝa virino malfermis ĝin; ŝi rigardis kun miro tiujn, por ŝi, strangajn vizitantojn. Tuj ŝi demandis ion per nekomprenblaj frazoj; heziteme mia amiko diris: «Cu sinjoro H. loĝas ĉi tie?».

«Jes, respondis la virino esperantlingve, bonvolu eniri la hejmon. Mi tuj avizos lin; sidu kaj atendu iomete», kaj ŝi ekiris surstraten.

La patro rigardis sian filon kun admiro, ĉar li ĵus konstatis du faktojn: oni bone komprenis lian filon, kaj oni lasis la domon sen timo al du nekonataj fremduloj. Post malmultaj minutoj, la virino revenis kun sia edzo, afabla persono, kiu salutis helpeme la vizitantojn. La juna filo klarigis al li la celon de tiu vizito, post kelkaj frazoj ili ĉiuj ekiris al la gastejo. Post reciproka prezentaĵo, la enlandano konsilis al ili pri demarŝoj, projektoj k. t. p. Du tagojn poste, ili kunvenis kun areto da lokaj esperantistoj, kiuj baldaŭ fariĝis kvazaŭ familianoj kaj helpis ilin dum la malfacilaj tempoj, ĝis alkutimiĝo al moroj kaj kondiĉoj de la lando.

La «praktika» viro devis relerni la anglan lingvon «surloke», sed danke li ankaŭ lernis la internacian lingvon, kiu tiel bone taŭgis, kiam la bezono premis.

D-ro CIRANO

ĈU LA HOMOJ POVAS PAROLI KUN BESTOJ EN ILIAJ LINGVOJ?

de *K. Heinz Wernicke*. - Munkeno (Germanio)

La aŭtoro pli frue jam klarigis, (*) ke la bestoj uzas aliajn proprajn «lingvojn», nome, ke ĉiu vokalo sono de la bestoj havas difinitan sencon. Nun li pretendas, ke la homo kapablas, per imitado de tiaj sonoj erarigi la alparolatan beston, kiu, tial, agas kvazaŭ ke samspecano estus tiel vokinta la sonon. Do, la homo povas paroli al la besto en ĝia lingvo. Por pruvi tiun pretendon, mi citu kelkajn ekzemplojn:

Estas konate, ke la ĉasisto allogas la virkapreolon, imitante la krieton de la kapreolino. En simila ma-

niero ĉiu homo povas venigi fenikuron fajfante la allogan tonon de ĉi-tiu birdo. Tiu tono estas facile imitebla. Sciuro, timete alrigardanta ĝenantan homon respondas ties klakantan sonon, estigatan per la lango, per samaj sonoj. Konatulo mia frumatene, per laŭta kokokriado, instigis ĉiujn najbarajn virkokojn respondi en pli malpli harmonia koncerto. La plej bonan ekzemplon la aŭtoro travivis dum migrado tra la kamparo. Li aŭdis virkokon allogantan belan kokinon. Kiam la aŭtoro ĵus aŭdinte la allogan tonon bone imitis ĝin, tiam la virkoko, jaluze, ataketis lin kaj volis forpeli la rivalon. Tio forte min impresis!

(*) Komparu la artikolon «Pri la lingvo de la bestoj» reproduktita el germana gazeto en la Septembra numero de nia Bulteno, kiu ni rekomendas relegi.

SCIENCA DISKONIGADO

GRAVA ELTROVO KONTRAŬ LA ASTMO

De D-ro R. Herrero - Valencio

La Medicino progresas rapide, fare de paciencaj kaj meritplenaj studoj de senlacaj serĉantoj. Foje la bonfara eltrovo estas sekvo de centoj kaj miloj da provoj, malsukcesintaj, sed preparigaj por la sukcesplena rezulto. Alifoje, la eltrovo ne sekvas tiujn alkatetitajn traserĉojn, kaj ĝi kvazaŭ ŝprucas senvole kaj aperas kiel konkreta fakto, antaŭ la okuloj de la observema kuracisto; kaj, per tiu neatendita rezulto oni aldonas al la kuracilaro novan metodon por mildigi aŭ forigi kelkajn aliajn gravajn malsanojn.

Ĉiuj scias, ke la mirinda eltrovo de la X radiojn, kies uzado tiom helpas al la diagnozo kaj kuracado de multaj malsanoj, okazis hazarde, kaj la observema kaj deduktema Röntgen bone eltiris rezultojn de tiu hazarda okazintaĵo. Multaj similaj faktoj, observitaj de zorgemaj kuracistoj, riĉigis la kuracarton per novaj metodoj aŭ medikamentoj; ofte, jam konataj kuraciloj, pacience studataj, trovas pli larĝan uzadon kaj iĝas pli gravaj ol antaŭe.

Inter la malsanoj, kiuj kruele vipas la homaron, troviĝas tiu nomata astmo, karakterizata de atakoj dum kiuj la spirado okazas tre malfacile kaj suferplene, kun konscio de baldaŭa sufokiĝo, kiu pliiĝas la dramatan situacion de la suferanto. Por forigi aŭ mildigi tiun neefteneblan suferon, oni elpensis multajn kuracilojn, sed la multeco de rimedoj jam indikas ia necertecon de la rezultoj.

Kaj, jen la eltroveto! De multaj jaroj, la kuracistoj uzas, por kuraci infektojn, elsangigojn kaj anemiojn, ian benzenan sulfamidon, vulgare nomata konga ruĝo.

La kuracilo ne estis tre uzata, ĉar ties uzado ne donis tre brilajn rezultojn. Sed, foje, oni observis, ĉe malsanulo al kiu oni injektis kongan ruĝon por korekti elsangigon, ke li ne plu suferis astmajn krizojn, kiuj, tre ofte vipis lin antaŭ la injektoj. Oni provis la kuracilon per konga ruĝo ĉe aliaj astmosuferantoj, kaj la rezultoj estis tre kuraĝigaj. La scienco, do ne haltas en sia irado!

Mi povas aserti la taŭgecon de la metodo, kiu, ankaŭ estas tute ne malutiliga, ĉar mi provis la metodon ĉe malsanulino tre punata de astmaj krizoj; tuj, de post la unua injekto, la krizoj tute malaperis, kaj dekkvin tagojn post la lasta injekto, ŝi ne plu suferis novajn atakojn.

Mi rapidas komuniki tiujn kuraĝigajn faktojn al la esperantistaro, por ke ĉiuj povu bonigi la staton de suferantoj, se, hazarde, ili ankaŭ konas tiajn kompatindajn malsanulojn.

Habiendo sido aprobados por la Superioridad los nombramientos efectuados, los componentes de la nueva Junta Directiva de nuestra Federación ya han tomado posesión de sus cargos, y se complacen en saludar a todos los afiliados y amigos del Esperanto en España. A la vista de los progresos realizados hasta la fecha, que demuestran una evidente madurez de nuestras actividades, ¿sería prematuro ir estudiando la posibilidad de celebrar una Asamblea o Congreso nacional, durante el verano de 1951, en la población que reuna las mejores condiciones para ello? Sirvan estas líneas como una simple sugerencia, que sometemos a la consideración de nuestros amigos, esperando conocer la opinión de ellos para dedicar a este asunto, si se toma en cuenta, la atención que su importancia merece

INTER LA PROZO DE

Gaja kaj feliĉa epizodo estis la ekskurso, kiun tra la arbaro faris karavano esperantista, je honoro de eksterlandaj gesamideanoj. Tra vojejoj, inter pinoj, aŭdiĝis kantoj kaj paroloj en la lingvo internacia; kaj apud fontoj densiĝis familiaj rondoj, en diligenta kunlaboro, ĉirkaŭ la altaro de pli aŭ malpli bongustaj manĝaĵoj, ĉar apetito ne mankis! Altaj rokoj kaj fortikaj kverkoj donis fonon de sovaĝa beleco al la pejzaĝo, tute nova kaj loga por la scivolaj rigardoj de tiuj geamikoj el ebenaj landoj; kiuj verŝajne unuan fojon fendis la misteron de abrupta montaro. Iliajn paŝojn mi sekvis zorgeme, mi aŭdis iliajn vortojn plenplenaĵojn de admiro, mi klare perceptis la skuetojn de ilia emocio, kaj intime mi ĝojis treege pro ilia ekstazo antaŭ la naturo, sub hela lazuro, kie same libere trilas la kardelo, kiel kviete ripozas la bela malbela skorpiono, kun sia damnita venena pikilo, interne de ŝtona ŝirmejo. Kiam denove, en la frua vespero, la arbaro restis sola kun siaj kutimaj loĝantoj, mi turnis min tuj al miaj helpemaj kolegoj, la ceteraj koboldetoj, kaj dankis al ili la servon, kiun ili plenumis nevideble gvidante, tra sekura loko, la vagadon de la esperantistoj, kiuj dum tuta unu tago, estis niaj gastoj laŭ mirinda ekzemplo, ke vere ja ebla estas harmonio kaj vivado en paco de homo kun homo.

Kaj nun, post mia societa kroniko, decas jam raporti pri ĵusa legado de kelkaj gazetoj, kies titoloj ankoraŭ ne aperis en mia rubriko:



THE BRITISH ESPERANTIST fine trafis miajn manojn, kiuj plej scivoleme foliumis la paĝojn de tiu longe atendata gazeto de la anglaj esperantistoj; kun sobra aspekto kaj serioza enhavo, plej parte en angla lingvo, ĝi estas aŭtoritato inter ĉiuj naciaj periodaĵoj de la esperantismo. LA SUDA STELO, organo de Jugoslaviana Federacio, estas grandformata kaj bele presita gazeto kun multaj ilustraĵoj; sub rubriko «Literaturo, Arto, Scienco» aperas bonegaj specimenoj. Jen komenco de tikla artikolo pri eterna temo «...evidentiĝis, ke ekzistas du opinioj koncerne la aktivigadon de societaj kunvenoj: Unuj opinias, ke, pere de la jam ekzistantaj societaj fortoj, oni devas fari la kunvenojn allogaj por novuloj; kaj la aliaj dezirus, pere de kursoj por komencantoj, venigi freŝajn fortojn, kiuj poste povos aktive partopreni la programojn kaj riĉigi ilin». VERDA STELETO, monata informilo de Centra Esperanto-Oficejo en Italio, estas tre bela kaj ampleksa gazeto reproduktita per litografia procedo; jen do kurioza novaĵo! La distribuo

La vizito de eksterlandaj gesamideanoj cis en nia pasinta numero, inter la amokaze de la printempaj festoj, ankaŭ ti plej multe agrabligis nian rondon, dum koncize dirite, ke gesinjoroj Schoon (Landsinjoroj Lanoux (Francio) estis en nia tiva kompletigaĵo de nia propra familia ni pretigis, Esperanto regis kaj pompis festoj, interne de amuzejoj, apud granejoj aŭ parkoj, survoje al najbaraj kaj arbaroj, dum interesaj ekskursoj.

Ankaŭ estis tempo por viziti ĵus komencintajn Landsinjorojn Schoon faris provlecionon pri rekta metodo. Ĉar nenio pli efika ol la faktoj, spertis oportuna ŝanco por taŭga propagandosperti mem la efikon de tiu proverbo, doloras disiĝo... Foriris jam la karaj goro lasis. Sed, kune kun la dolĉaj rememoroj, ne vana estas la senco de ĉi tiuj

ESPERANTISTA GAZETARO

de la fakoj kaj aranĝo de la paĝoj treege similas al nia Bulteno; estis agrabla surprizo vidi la tradukon de tuta paĝo el nia hispanlingva rubriko pri la tutmonda movado. NIA VOĈO estas tre modesta kaj simpata ĵus aperinta gazeteto de la Dana Laborista Asocio; en frontartikolo oni tamburas pri la jarkunveno, komence de Majo, en Odense, la bela norda urbo, kie ankoraŭ nun loĝas malnova amiko H. P. Frodeŭnd, unua eksterlandano, kiu iam adreŝis leteron al mia fungodometo en la arbaro. Ankaŭ el malproksima Ameriko, spirite tiel proksima, venas tri novaj titoloj: NIA FLAMETO, monata organo de Rosaria Esperanto-Klubo en Argentino; inter oportunaj artikoloj en hispana lingvo, pompas belaj klarigoj, elektitaj versoj kaj spritaj anekdotoj en Esperanto; BULTENO de Argentina Esperantisto daŭrigas la taskon kaj grupigas la fortojn laŭ nacia amplekso. Per la tuta forto de mia kobolda koreto, mi salutas la karajn geamikojn, kiuj varme kaj vigle laboras por sama idealo, trans la Atlantika oceano. De

estas bela plezuro. Kiel oni jam anonkis eksterlandanoj, kiuj venis al Valencio, ĉeesto da gesamideanoj, kiuj per sia ĉeestaro de kelkaj neforgeseblaj tagoj. Estu (b), gesinjoroj Martens (Belgio) kaj gene ja nur bonvenaj gastoj, sed efektiva diversaj aranĝoj, kiujn honore al ili: meze de bruaj stratoj de la urbo en umentoj aŭ ĉefaj vidindaĵoj, en promeaj eĉ tra la impona kvieteco de montoj e oni povis longe kaj longe babili.

kurson, kie plej sukcesplene sinjoro unu ĝoja partopreno de ĉiuj gelnan-intervjuo kun tre konata ĵurnalisto esia afero. Kaj fine, venis la momento lankolie avertas, ke post alĉutimiĝo restas nur la malpleno, kiun ilia forie ilia restado, ni dorlotas la esperon, ke facile diritaj vortetoj: Ĝis revido!

tie ankaŭ venas, kun frataj salutoj, BOLIVIA REVUO heroldo de la internacia lingvo en lando, kie hispanoj povas paroli hispane. Kiel specimenon de ĉi tiu revueto mi prenas kelkajn vortojn, kiuj estas kvazaŭ aroga devizo: «Propagandon pri Esperanto oni devas fari nur pere de naciaj lingvoj, sed kiam oni skribas en la internacia lingvo, oni devas trakti pri aliaj temoj. En ĉi tio loĝas la valoro de Esperanto.»

IDIOMA INTERNACIONAL estas hispanlingva informilo el Montevideo, ĉefurbo de Urugvajo. Kun bela preso, sur tre bonkvalita papero, la lasta numero informas pri la sindona agado de Henriko Legrand, ne sufiĉe konata pionoro, sed fervora apostolo de nia movado en suda Ameriko, kiu mortis antaŭ kelkaj jaroj. Salutinda estas la printempa ekflorado de nia gazetararo en la vasta kontinento, kie la lingva problemo ne estas tiel akuta, kiel en Eŭropo kaj Azio; pro tio mem, duoble salutinda! LA INTERLIGILO, centra organo de fakinformoj, kies redaktejo sidas en franca urbo, estas treege interesa informilo, precipe por la filatelistoj.

Jen ĉio do jam! Laca, tre laca mi estas hodiaŭ; forte mi emas al dormado, kun la espero revidi la agrablajn vizaĝojn de ĉiuj geamikoj, kiuj venis, ĝis la densejo de mia arbaro, por partopreni unu tagon en la hele sana vivo de libera naturo, ekster la rebriloj de fie gaja amuzado en grandaj ĉefurboj.

Tion opinias, kun via permeso

LA LEGEMA KOBOLDETO



FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

ALEMANIA. — En Hamburgo se han ofrecido cuarenta maestros para enseñar el Esperanto en las escuelas municipales; habiéndose inscrito más de mil niños, todos ellos con el mayor entusiasmo.

«Germana Esperanto-Instituto» ha recibido las siguientes subvenciones oficiales durante el pasado año: 1.000 marcos del Ministerio de Instrucción de Westfalia; 2.000 del de la Baja Silesia; 1.000 del de Baviera y 500 del de Wurtemberg; también han concedido subvenciones el Ayuntamiento de Freiburg (500 marcos) y el de Munich (200 marcos).

COREA.—El Esperanto está siendo enseñado en el «Scout Teachers College» de aquella lejana población.

ESTADOS UNIDOS. — Según una estadística realizada por «América Esperantista», once de las más grandes empresas de transportes y aviación del mundo, mantienen correspondencia internacional en Esperanto, hacen propaganda, contratan traductores y dan cursos de Esperanto a sus empleados; cuatro grandes industrias pesadas, varias manufacturas, catorce firmas importadoras y exportadoras, y once agencias de turismo, todas de importancia internacional, dan y reciben informes en Esperanto.

FINLANDIA. — La Administración de los Ferrocarriles del Estado, ha editado, para entregar al personal de servicio de los trenes, un folleto para responder a las preguntas usuales de los pasajeros. dicho folleto está publicado en los siguientes siete idiomas: finlandés, sueco, ruso, alemán, inglés, francés y Esperanto.

HOLANDA. — La «Katholieke Radiogids» nuevamente emite su sección en Esperanto. En la Escuela Normal Católica de Arnheim («Insula Dei»), funciona un curso. En la escuela profesional «Technicum», de Rotterdam, se ha hecho obligatorio cursar el Esperanto en los tres primeros cursos; 45 alumnos siguen dichos cursos.

CONGO BELGA. — Un curso de Esperanto se ha dado en la escuela de Elizabethville. ¡Hasta en el centro de Africa!...

FRANCIA. — Como consecuencia de la circular del Ministerio de Educación Nacional, de 11 de octubre de 1948, exponiendo a los rectores de establecimientos de enseñanza «el deseo de facilitar el desarrollo de estudios esperantistas,» muchos cursos de Esperanto se han organizado en los centros de primera y segunda enseñanza.

Los más interesantes son los organizados en las Escuelas Normales. En las de Besançon, Toulouse y Versailles, ha sido aceptado el Esperanto entre los tres estudios elegibles voluntariamente y se cursa como asignatura, dentro del horario obligado; en las de Lyon, Valence, Paris y Chalons-sur-Marne, los alumnos que lo desean cursan el Esperanto fuera del horario obligado.

GRECIA. — Durante el pasado año se han dado cursos de Esperanto en varias Escuelas Superiores e Institutos.

HUNGRIA. — El Esperanto puede ser enseñado en las escuelas, a título facultativo, según autorización concedida por el Ministerio de Instrucción.

POLONIA.—Los Ministerios de Correos y de Ferrocarriles han recomendado a los alumnos de sus Escuelas Técnicas seguir cursos de Esperanto.

SUECIA.—El Parlamento ha concedido una subvención de cinco mil coronas a favor de los cursos creados por la Asociación de Maestros.

NORUEGA.—Por la «Asociación de Maestros de Escuela Primaria» se ha organizado un curso de Esperanto para sus miembros.

NUEVA ZELANDA.—La «Escuela por correspondencia, del Estado», ha emitido por radio lecciones de Esperanto durante el último otoño.

GRAMATIKO

Per lingva kulturo de ĉiuj parolantoj de la kataluna lingvo estas granda okazaĵo la ĵusa apero de «Gramática Valenciana» de M. Sanchis Guarner. Per tiu verko la aŭtoro evidentiĝas tre klera gramatikisto kaj filologo. La katalunlingva popolo e! Valencio elstaras en la kataluna literaturo per la grandaj verkistoj Ausias March kaj Joanot Martorell, kiel klasikuloj. Ne tro mirigu, do, ke en la renaskiĝo de tiu literaturo estas bonaj aŭtoroj modernaj, prozistoj kaj poetoj. Pli maloftaj ol beletraj verkistoj, en ĉiuj lingvoj, estas gramatikistoj. Kaj post Lluís Fullana kaj Carles Salvador, nun aperas kiel lingvisto kaj eminenta filologo Sanchis Guarner. Lia verko estas profunda traktajo pri ĝenerala gramatiko. Granda helpo por esperantistoj, estas profunda kono, scio, de ĝenerala, komuna, gramatiko. Tiusence la «Gramática Valenciana» de Sanchis Guarner tre utila estos ja al ĉiuj katalunlingvanoj, speciale valencianoj, kiuj ĝin iĝos aŭ konsultos. kun serioza atento.

Multaj el la valenciaj formoj kiel **meua** krom la oficiala kataluna **meva**, **atre** krom **altre**, **ser** krom **esser**, ekzistas en aliaj regionoj, eĉ tiel malproksimaj de Valencio kiel norde de Girono.

Kaj nun, okaze de tiu grava verko, ĉu ni faru enketon pri ortografio de ĉiuj vorto? Ne en ĉiuj katalunlingvaj regionoj konfuziĝis la fonemoj de **b** kaj **v**, kiel okazis en ĉiuj kastillingvaj regionoj. Tial niaj gramatikistoj povas certigi, ekzemple, pri la korekta ortografio de **Havi**, **Cavall**, **proVar**, **arribar**, kontraste kun la kastilaj **labio**, **caballo**,

probar kaj la franca **arriver**. Tamen, estas vorto **tivar**, pri kies ortografio oni ankoraŭ ne unuanime akordiĝis, iuj ĝin skribas per **v** kaj aliaj per **b**. Lastatempe ankaŭ Pompeu Fabra ĝin ortografiis per **b**. Mi havis okazon ĝin elparoligi al kataluno el regiono, kie **b** kaj **v** estas diference prononcataj; mi konstatis, ke tiu kataluno elparolis **tibar** kaj ne **tivar**. Ekzistas ankaŭ en Valencio regionoj, kie la diferenco inter **b** kaj **v** estas aŭdebla. Ni agrable surprizus la valencian eminentulon Sanchis Guarner, se ni, la esperantistoj, sukcesus klarigi per enketo ĉu valencianoj, kiuj diferencigas la fonemojn de **b** kaj **v**, elparolas **tibar** aŭ **tivar**.

DELFI DALMAU (Barcelona)

CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO en PARIS del 5 al 12 de Agosto de 1950

La Federación Esperantista Española, con el buen deseo de facilitar a sus miembros la participación en este importantísimo certamen, ha realizado las necesarias gestiones, y se han logrado de una acreditada Agencia las siguientes condiciones de viaje (ida y vuelta), desde Barcelona a París, incluido el pasaporte:

En 1.^a clase 1809'50 pts.
» 2.^a » 1381'10 »
» 3.^a » 1106'70 »

Naturalmente, los gastos de estancia y los de adhesión al Congreso (alrededor de 2000 francos) son por cuenta del congresista. Los interesados pueden dirigirse a nosotros en demanda de los necesarios detalles, con la seguridad de ser atendidos.

ATENTIGO

Pro internaj aferoj de la presejo, kie nia Bulteno estas prilaborata, la nuna numero aperas tre maltrus kaj kun evidentaj teknikaj mankoj. Nia kara legantaro scios pardoni, pro tio sincere ni dankas, kaj plej akurate ni zorgos.

«Ĝus ni ricevas komunikon el Romo, ke la Prezidanto de la Itala Ligo de Katolikaj Esperantistoj, kaj la Prezidanto de la L. K. K. pastro Caroli, estas nomita Jubilea Konfesprenanto en la Baziliko de S-ta Johano en Laterano. Sur lia konfesejo estas la teksto: «ONI KONFESPRENAS EN ESPERANTO». La horoj estas: mardo 9-10; vendredo 9-11; dimanco 10-12 kaj 16-17. Ne nur dum la kongreso, sed dum la tuta Sankta Jaro». Vere interesa sciigo por la katolikaj esperantistoj!

★ LA LERNEJO

CONSULTORIO LINGÜÍSTICO

J. J. I. de CACERES.—El pronombre relativo **SI** tiene para los principiantes algunas dificultades, todo es cuestión de fijarse un poco al principio, hasta que se acostumbre usted y luego lo empleará adecuadamente siempre con suma facilidad. Tenga en cuenta que se refiere siempre a la tercera persona, cuando ésta es sujeto de la oración. Ejemplos: **Li parolis kun sia frato, ili finis sian laboron, la arboj donas siajn fruktojn.** Y si yo hablo con el hermano de él no se puede decir **mi parolas kun sia frato, sino kun lia frato.** Si yo termino el trabajo de ellos, **mi finas ilian laboron**, y no **sian laboron.** Y si yo cojo los frutos de los árboles, **mi prenas iliajn fruktojn.** En los casos en que la oración no tiene sujeto gramatical, y además depende de otra que sí que lo tiene, se debe considerar como sujeto no el de la oración de la cual depende, sino el sujeto lógico de la oración dependiente. Ejemplos: **La kaporalo ordonis al la soldato vesti sin** (la soldaton), **li konas kelkajn homojn nur por si malavarajn** (por ili), es decir, para ellos. Estudie bien estos ejemplos, ejercítese con otros y cualquier duda que tenga, escribanosla sin reparo, pues ya sabe que se la resolveremos con mucho gusto. Estamos para esto, y nos alegramos cuando recibimos cartas de esta naturaleza, porque revelan el interés por aprender y perfeccionarse que tienen nuestros lectores. Preferimos explicar y aclarar las consultas cuantas veces sea necesario, a que el lector siga en sus dudas, usando incorrectamente el idioma. Damos a Vd. las gracias por sus alabanzas, que desde luego no merecemos. Saludos.

J. Bosch

LA INTERLIGILO

FRANCA MONATA ELDONO

Jarabono: 10 pesetoj - Anoncoj: senpage

Sendante la koston de la afranko
oni ricevas provaĵempleron

Delegito: J. MASET - Apartado 15-FIGUERAS (Gerona)

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatas al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandanaoj pri div. temoj. Respondo garantata.

J. VIGO MESTRE.—«El Barato», Martinet de Cerdaña (Lérida), deziras korespondi kun fremdaj samideanoj pri arto kaj moroj.

GERMANIO. — SIEGFRED BREZINSKI - Bahnkofstr., 12 (21 a) Bockum-Hovel (Vestfalia) - deziras koresp kun gesamideanoj el Valencio.

JAPANIO.—RIOKITI KAMIYA-Sangyo Hukko Kodan - 35, Higasi 3 bantyo - SENDAI - serĉas gekorespondantojn hispanajn por japanaj ĝeamikoj.

NEDERLANDO.—H. J. BELLARD - VRIESPLEIN, 5 DORDRECHT deziras interŝ p. m. kun hispanaj amikoj.

PARA NUESTRO BOLETIN

4.^a lista de donativos (ABRIL 1950)

Suma anterior	329 Fias.
Vicente Perles (Miraflores-Vergel)	19 »
José M. ^o Arias (Sevilla)	10 »
José Molina (Alfara de Algimia)	5 »
Florencio Muñoz (Alcázar S. Juan)	10 »
Pedro Alcedo (Bilbao)	6 »
Isauro Alvarez (Madrid)	10 »
Eusebio Pons (Barcelona)	5 »
Amado Pons (Barcelona)	5 »
Miguel Fábregas (Barcelona)	5 »
Luis de Ctaola (Bilbao)	1 »
Excursionistas a Porta-Coeli (Valencia)	25 »
Total	430 »

Como puede verse, no decae el fervor de nuestros amigos. ¡Sigamos, pues con este ritmo!

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en **HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

Las dos últimas categorías dan derecho

Socio de número ...	12 ptas. anuales
Socio abonado.. ...	25 » »
Socio protector... ..	50 » »

a la recepción de nuestro Boletín.